

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 20/12/2018 Kvarcentkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)

SENDITA AL 325. La informa kaj noma paĝoj reaperos nur kun la dekaj eldonoj



Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj. *[openclipart](#)* *[reta-vortaro](#)* [Freelang Vortaro](#)* *[Plena Ilustrita Vortaro](#)*
 [Google Translate](#) *[Pasintaj AE eldonoj](#)* *[Duolingo](#)* [duolingo all courses](#)*
[lingvohelpilo](#)* *[PMEGramatiko](#)* *[Esperanta Retradio](#)*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **765,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **363,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **309,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)


Nun studas **93,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.”.

N.ro 47 (La Plena Analiza Gramatiko de Waringhien kaj Kalocsay)



Ĉe ago en Substantivo, la Subjekto de tiu ago normale indikatas per “de”-Suplemento: “La forflugo de la birdoj.”, kaj “La manĝado de la infano”. Sed kiel ni vidis en aliaj artikoloj, ĉe substantivo kun transitiva verbradiko, la Zamenhof’aj signifoj de “de” ne klare diras, ĉu la de-prepozitivo indikas la aganton aŭ la suferanton de la ago, kiel en “La murdo de la policano”, kiu frazo havas du kontraŭajn signifojn. Sed intertempe mi kreis prepoziciaĵojn klarige montrantajn la aganton aŭ suferanton: “La murdo ate de la policano” kaj “La murdo ante al la policano”, la nura maniero por en Esperanto montri la signifon el la du eblaj ĉe “de”. La verkantoj de PAG tiam ankoraŭ ne sciis tiun unikan solvon, kaj do ne menciis ĝin. La Subjekto de la ago en Adjektivo estas la aganto indikita en ĝia Substantivo: “La suno estas varmega kaj brulanta”.



Marcel Leereveld

Macel estas ankoraŭ en la malsanulejo sed li malrapide resaniĝas. Informis Heather Heldzingen
Ankaŭ mi deziras al Marcel rapidan kaj kompletan resaniĝon. Trevor Steele



Zamenhofa Tago 2018



"LA ESPERO"
HONORE AL LA 159-A
NASKIĜDATREVENO DE D-RO
ZAMENHOF, LA LBV-ANOJ DEKLAMAS
LIAN POEMON KUNE KUN SAMIDEANAJ
GEAMIKOJ. AL ĈIUJ INVITITAJ
PARTOPRENANTOJ, NI ESPRIMAS
NIAN KORAN GRATULON KAJ
VARMAN DANKON.

Tre kara samideano,

Jen la kora omaĝo de Legio de Bona Volo (LBV) per filmo okaze de la ĉijara Zamenhofa Tago. Ni afable invitas Vin spekti tiun filmeton, kiun ni zorge preparis por Vi.

Se ĝi plaĉas al Vi, bonvolu diskonigi ĝin al viaj konatuloj per via retroŝta listo kaj per sociaj retoj. Anticipe ni elkore dankas Vin.

Belan kaj ĝojan Zamenhofan Tagon por Vi!

[La Espero](#)

Bondeziroj

[La Espero 2](#)

La himno



Samideane kaj samlingvane, [Maria Aparecida da Silva](#), www.bonavolo.com
www.paivanetto.com/eo



Universitata Agado *Esperantic Studies Foundation (ESF)*



Se vi instruas aŭ instruis en universitato kaj parolas Esperanton, bonvolu plulegi kaj reagi:

- * sendu vian nomon, urbon, landon, ret-adreson, fakon pri kiu vi instruas aŭ instruis al la ret-adreso <esperanto.en.universitatoj@gmail.com>
- * se vi, krome, instruas kurson pri Esperanto aŭ pri interlingvistiko en via universitato, informu ankaŭ pri tio.
- * se vi deziras financon helpon de ESF por realigi scian esploron pri

Esperanto aŭ interlingvistiko, bonvolu rigardu la

kriteriojn: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/>

* se vi deziras finanĉan helpon de ESF por partopreni scienĉan konferencon aŭ kongreson neesperantistan por prezenti tie referaĵon, bonvolu rigardu la

kriteriojn: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/>

* se vi ŝatus partopreni la laborojn de reto de universitatanoj por internaciigi la universitatan medion per Esperanto, informu ankaŭ pri tio.



Temas pri klopodo intensigi la agadon por Esperanto en universitatoj kunlabore inter ILEI kaj ESF.

Dankon! Nome de la Komisiono de ILEI pri Universitata Agado kaj de ESF **Renato Corsetti**



“Malgrava historiĉeto pri mia vivo” Bob Felby

Postskribo



Ĵus venis en mian kapon, ke post kvin jaroj mi estos loĝanta en Aŭstralio pli longe ol mi loĝis en Danlando. Do eble mi devus konsideri Aŭstralion mia tria gepatrolando, sed kompreneble mi ne plu, post tiom da jaroj, konsideras iun ajn landon io ajn, ĉar la tuta mondo estas mia gepatrolando.

Ni daŭrigas la instruadon de la unusola lingvo taŭga kiel mondlingvo. Ni okazigas kunvenojn, ekskursojn, distradojn ktp. Unu fojon ĉiujare ni okazigas feston zamenhofan, Somerkursaron kaj Kongreson. La aŭstralia Esperanto-movado nuntempe entenas tiom da talentuloj, kiuj vere laboregas pozitive por progresigi Esperanton, ke almenaŭ mi nun rajtas ripozi kaj ĝui la vivon, dum mi ankoraŭ havas ĝin !

Sed estas ankoraŭ io, kio ne restu nemenciita. Estas nia devo certigi, ke la lingvonivelo, ne nur en Aŭstralio, sed en la tuta mondo, plialtiĝu ! Ni laboru por la fina venko de Esperanto. Tio signifas, ke ni multe pli serioze laboru. Esperanto ne estas nur ludilo por lingvistoj. Ni devas strebi al pli bona lingvouzado, t.e. senerara skribado kaj parolado. Necesas ke ni ne plu faru gramatikajn erarojn. Tial gravas, eĉ gravegas, ke ni ĉiun Somerkursaron havu instruiston, kiu ĝisfunde konas la Esperantan gramatikon. Sed ne nur tio. Ni devas lerni respekti la regulojn pri la elparolado de nia lingvo. Zamenhof diris, ke oni emfazas la antaŭlastan silabon de la vortoj, ne la unuan. Tio malfacilas al multaj denaskaj parolantoj de la angla lingvo, sed ne maleblas provi. Fakte ni bezonegas instruiston, kiu kuraĝas emfazi al la gelernantoj, ke estas diferenco inter la sonoj de “B” kaj “P”; “D” kaj “T”; “F”, “V” kaj Ŭ; “G” kaj “K”; “S” kaj “Z”; “Ĝ” kaj “Ĵ”. Sed ne prezentas problemojn nur la konsonantoj. Estas diferenco ankaŭ inter la vokaloj “A” kaj “U”, kaj “E” kaj “I” !

Ni devas imagi al ni, ke iun belan tagon venos mesaĝo de la trafikministro de la registaro, ke ekde la 1-a de januaro 2010 Esperanto estos akceptata kiel oficiala dua lingvo en Aŭstralio, espereble ankaŭ en la cetera mondo, ĉu ne ? Nun la registaro petegas nin traduki unue la miriadojn da strat- kaj vojsignoj. Kiel en la mondo oni tradukas per tre mallonga vorteto, sufiĉe mallonga por povi esti sur tia stratsigno la vorton “aŭtomobilrestadigejo” ? Ĉu iu el vi scias ???

Plaĉus al mi, se ĉiuj, kiuj vere interesiĝas pri nia belega lingvo, praktikus ĝin. Oni povas skribi ĉiujn siajn notojn en ĝi. Oni povas sonĝi en ĝi, kion mi plurfoje faris. Iam ensonĝe mi parolis kun Zamenhof. Mi sidis sur benko en fremdlanda urbo, ie en Sudameriko, kaj subite venis Zamenhof, sidigis sin apud min, kaj ni paroladis en lia mirinda lingvo !

Sed al vi, kiuj jam lernis Esperanton, kaj eĉ instruas ĝin, mi ŝatus diri, ke vi povus praktike uzi la lingvon interparolante kun aliaj esperantistoj, ekz. dum niaj Esperanto-kunvenoj ni ne estas devigataj paroli en la angla, dana ktp. Ni rajtas, kaj fakte laŭ mi, devas paroli nur Esperanton. Aliel mi ne scias kiel konvinki la ceteron de la homaro pri la avantaĝoj de nia lingvo!

Miaj finaj vortoj al vi ĉiuj estas do, laboru por Esperanto organizante kaj instruante ktp. Vi rajtas muziki kaj danci, eĉ kanti, kondiĉe ke vi kantas en Esperanto. Mallonge dirite, ĝuu la vivon instruante Esperanton, sed unue lernu ĝin. Kiel diras Atiljo, “por instrui lingvon, gravas mem profunde koni ĝin ! **BobFelby**

La fino de la libreto de Bob Felby



Eunice Graham regardas sian belan festan kukon.



16an decembro 2018
Varmajn gratulojn al
Eunice Graham pro
ŝia centjariĝo.
Festo aranĝita per
ŝia filino, Jane.

Roger Springer



Pri aŭstraliaj birdoj kaj la demando de Franciska

Mi trovis en "Australian and New Zealand Esperanto Dictionary", de Ralph Harry kaj Brian Fox, 2000, ke la *lorikeet* nomiĝas lorikito aŭ verda papageto en Esperanto (por kaj *Trichoglossus* kaj *Glossopsitta*). La specio *Trichoglossus moluccanus* nomiĝas ĉielarka lorikito. Kaj estas aliaj specioj.



La bower birds oni metas en la genron *Ptilonorhynchus* kaj la specio *Ptilonorhynchus violaceus* nomiĝas satena laŭbobirdo.



En Vikipedio troviĝas artikolo pri la ĉielarka lorikito

https://eo.wikipedia.org/wiki/Trichoglossus_haematodus, sed mankas tie esperanta nomo por ĝi. Ankaŭ ekzistas artikolo pri la laŭbobirdoj, ĉe <https://eo.wikipedia.org/wiki/Ptilonorinkedoj> sed ankaŭ mankas esperanta nomo. Tamen ekzistas artikolo pri la "makula ptilonorinko" (*Ptilonorhynchus maculatus*). Ne ekzistas vera aŭtoritato pri la nomado de birdoj kaj aliaj organismoj en Esperanto, do ofte ekzistas diversaj proponoj por la sama afero.

Donald Rogers



Adelajda Zamenhofa Tago



Libby Mortimer, Trevor Steele kaj Fred Welling kantas.



Cathy Taggart kaj Eileen Jones pupteatumas

Dek ses adelajdaj esperantistoj celebris la Zamenhof-feston la 15-an de decembro en la hejmo de Indrani Beharry-Lall. Kiel kutime, ni havis festparoladon, poemojn, pupteatraĵeton, anekdotojn, skeĉojn, interesaĵon pri la pionira esperantisto ... kaj bongustajn manĝaĵojn por la komuna vespermanĝo. Sandor Horvath kaj Helen Palmer salutis nin el APY-landoj pere de skajpo.

Katja Steele



La Melburnaj Esperantistoj celebris Zamenhofan Tagon




Sabate la Melburnaj Esperantistoj celebris Zamenhofan Tagon per belega muziko de Trevor kaj Suzanne Holton, kaj bela rusa kanto de la Knox U3A grupo. Franciska kaj Suzanne distris nin per poemoj kaj Karlo rakontis serĉojn.

Heather faris la Festparoladon pri la temo la 70a datreveno de la Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj iom de la historio de ĉartoj pri Homaj Rajtoj dum la antikvaj kaj mezepokaj tempoj. Ni aŭdis mesaĝon de Alan kaj Jennifer Bishop, kiuj sendis bondezirojn al ni por nia Festo el Anglujo.

Ni bonvenigis novajn Esperantistojn kaj ankaŭ Ran Luv, vizitanto el Israelo.

Tristan bone estris la programon. Ni finis la feston per la Espero kaj poste bone vespermanĝis. **Heather Heldzingen**



Zamenhofa festo en Melburno (Aŭstralio)

Sabaton la 15an de decembro 2018 la melburnanoj celebris la zamenhofan feston. Bedaŭrinde venis nur dek kvin homoj: ĉirkaŭ dek homoj ne venis aŭ ĉar ili estis malsanaj aŭ pro alia devigo.

Tamen la programo estis bunta. Suzanne kaj Trevor Holton , profesiaj muzikistoj, ludis violonon kaj pianon; la grupo de Knox kantis la rusan kanton , Katjuŝa; Karlo Egger rakontis tri ŝercojn; Suzanne deklamis poemon pri meleagro, Franciska Toubale elektis poemon de Jenny Wrangborg "Mi estas homo" el la poemaro Malvarma bufedo, esperantigita el la sveda de

Gunnar Gällmo kaj eldonita de la Sveda Laborista Esperanto Asocio. Sed la ĉefa parto estis la festparolado de Heather Heldzingen pri la historio de Homaj Rajtoj, kies datreveno okazas ĝuste en la sama semajno kiel la zamenhofa festo.



Post la solenaĵoj kaj distraĵoj, ni renkontiĝis ĉirkaŭ granda tablo, plenplena de frandaĵoj, por babili kaj konatiĝi kun la novuloj. Estas ĉiam plezuro vidi junajn vizaĝojn

Franciska Toubale



Brizbana Zamenhofa Tago



14 membrojn kaj unu gaston ĝojigis sukcesa Zamenhof Festo apud la Brizbana Rivero per tre bongusta meztagmanĝo, tuj post regalado de kafo & kuko ĉe 'GOMA' muzeo kaj afabla bablado. Ni ankaŭ ĝojis veturi per rivero-pramŝipo aŭ promeni ĉirkaŭ belaj ĝardenoj sub sunbrilo.

Peter Danzer





La Manlia Esperanto-Klubo



Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm. Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagota kafo atendos vin. La 15a de decembro estis

la tria sabato. Venis al la Manlia grupo, Roger Springer, Chris Holliss, Eunice Graham kaj John Casey. Bonaj amikoj kaj senpaga kafo. **Roger Springer**



Survive??

En sia artikolo (AE404) Bob uzas "survivi" por esprimi la anglan "survive". Vivi sur io...?

Mi preferus "pretervivi", en kelkaj kuntekstoj "travivi", eble eĉ "transvivi". **Trevor Steele**



Laŭdo

En la 2019 januara eldono de la UEA revuo "Esperanto", troviĝas artikolo pri Profesoro M H Sahebzamani, la fama kaj ege aktiva Esperantisto, kiu foje estis studento de la eminenta matematikisto, historiisto, filozofo, logikisto, verkisto socia kritikisto, politika aktivisto kaj Nobel-laŭreato, Bertrand Russell (1872-1970). Laŭ Prof. M.H.S, Bertrand Russell opiniis pri Esperanto: *Inter la lingvoj, Esperanto estas la plej proksima al la matematika kaj logika idealo pro sia senescepta regularo.* Ne malgranda laŭdo, ĉu?

Vera Payne



POLVOŜTORMOJ

Ankaŭ mi spertis similan ŝtormon kiel Trevor kiam mi laboris en altega konstruaĵo ĉe St Kilda Melburno antaŭ 40 jaroj. La nubo aperis el la okcidento kaj ankaŭ ĝi estis nigra. Kiam ĝi alvenis nian konstruaĵon subite la tuta mondo malaperis kaj ni estis tute solaj en la mondo.

Henry Broadbent



LA ESPERO

Esperanta himno

Esperanta kunkanto (Karaoke) kun A-cappella Ĥoruso **Roger S**

La Kluboj <http://aea.esperanto.org.au/local-groups/>

Brisbana Esperanto-Societo Petro Danzer Tel: 0402 766 557

Retpoŝto: brisbane@esperanto.org.au

Central Coast and Newcastle Esperanto Club Joanne Cho Tel: 0413 087 340

Retpoŝto: centralcoast@esperanto.org.au

Esperanto Coffee Club of Canberra Huigh Malcolm Tel: (02) 6288 4334

Retpoŝto: canberra@esperanto.org.au

Esperanto Federation of New South Wales Tel: (02) 9319 4775

Retpoŝto: nsw@esperanto.org.au

Esperanto in South Australia Indrani Beharry-Lall Tel: (08) 8285 3128

Retpoŝto: sa@esperanto.org.au

Esperanto League of Western Australia Shayne Power Tel: (08) 9343 9532

Retpoŝto: esperantowa@hotmail.com

Manly Esperanto Club Roger Springer Tel: (02) 9976 6320

Retpoŝto: manly@esperanto.org.au

Melbourne Esperanto Association Heather Heldzingen Tel: (03) 9525 4295

Retpoŝto: melbourne@esperanto.org.au

Tasmanian Esperanto Society Kam Lee Tel: (03) 62251474

Retpoŝto: tas@esperanto.org.au

Torquay Esperanto Coffee Club John Adams Tel: (03) 5261 2899 / 0421 043 272

Retpoŝto: torquay@esperanto.org.au

Tuvumba Esperanto-Societo Hazel Green Tel: (07) 4691 1238

Retpoŝto: toowoomba@esperanto.org.au

Se informon pri via klubo mankas aŭ eraras informu min. **Roger Springer** rspring@tpg.com.au



Roger Springer

AE deziras
Feliĉan
Kristnaskon
al vi



3ZZZ. La elsendo de la 17a de decembro povas doni al vi ideojn pri noveldonitaj romanoj en Esperanto kaj instrui vin pri la potenco de mensogoj.



Franciska Toubale